

# La Riverego

Kebekia esperantista bulteno

<b>Reformoj de la angla</b>	<b>5-7</b>	<b>Kion ni faru ?</b>	<b>13</b>
<b>Klingonlingva opero</b>	<b>8</b>	<b>Rotarianoj en Montrealo</b>	<b>14</b>
<b>L'espéranto est-il sexiste ?</b>	<b>9-11</b>	<b>Opinie : UN</b>	<b>15-16</b>
<b>Mia plej ŝatata infan-libro</b>	<b>12</b>	<b>La ricinsemoj</b>	<b>17</b>

## Feliĉan Zamenhof-tagon !

La 15-an de decembro esperantistoj ĉirkaŭ la mondo festas la datrevenon de Zamenhof. Iuj preferas la tradician nomon – la Zamenhof-tago, kaj iuj preferas nomi ĝin la « Tago de Esperanto-literaturo » aŭ « Tago de Esperanto-libro ». En kiu ajn kazo, ĝi estas bonega eblo revidi la Esperanto-amikojn, deklami poemojn, interŝanĝi la novaĵojn, preparoli (kaj aĉeti !) novajn Esperanto-librojn. Se vi loĝas en Montrealo aŭ proksime, ne maltrafu tiun okazon por viziti la komunan manĝon kaj festi la Decembran Feston kun la samideanoj ! Feliĉan Zamenhof-tagon kaj feliĉajn festojn !

## Joyeux Zamenhof-Tago !

*Le 15 décembre, les espérantistes du monde entier célèbrent la naissance de Zamenhof. Certains préfèrent le nom traditionnel de cette fête, Zamenhof-tago, alors que d'autres la nomment « Jour de la littérature espéranto » ou « Jour du livre espéranto ». Quoi qu'il en soit, il s'agit d'une excellente occasion de revoir des amis espérantistes, de déclamer des poèmes, de discuter des nouveaux livres en espéranto (et d'en acheter !). Si vous habitez Montréal ou les environs, ne manquez pas l'occasion de participer au repas communautaire et de célébrer la Fête de Décembre avec les samideanoj. Joyeux Zamenhof-Tago et joyeuses fêtes !*

*Je la okazo de la Zamenhof-tago, ni malfermos ĉi tiun numeron per unu el liaj plej famaj Esperanto-poemoj : La Preĝo sub la verda standardo, verkita okaze de la unua Universala Kongreso de Esperanto.*

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,  
fortego, la mondon reganta,  
al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero  
kaj fonto de vivo konstanta,  
al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,  
sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,  
al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu reĝas,  
hodiaŭ ni preĝas.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,  
kun dogmoj de blinda fervoro :  
silentas nun ĉiu disput' religia  
kaj regas nun kredo de *koro*.  
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,  
kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,  
ni staras nun, filoj de l' tuta homaro  
ĉe Via altaro.

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
sed ĝi sin dividis batale ;  
popolo popolon atakas kruele,

frat' fraton atakas ŝakale.  
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,  
aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,  
redonu la pacon al la infanaro  
de l' granda homaro !

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,  
por reunuigi l' homaron.  
Subtenu nin Forto, ne lasu nin fali,  
sed lasu nin venki la baron ;  
donacu Vi benon al nia laboro,  
donacu Vi forton al nia fervoro,  
ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj  
nin tenu kuraĝaj.

La verdan standardon tre alte ni tenos ;  
ĝi signas la bonon kaj belon.  
La Forto mistera de l' mondo nin benos,  
kaj nian atingos ni celon.  
Ni inter popoloj la murojn detruos,  
kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos



kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero  
ekregos sur tero.

Kuniĝu la fratoj, plektiĝu la manoj,  
antaŭen kun pacaj armiloj !  
Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj  
ni ĉiuj de Di' estas filoj.  
Ni ĉiam memoru pri bon' de l' homaro,  
kaj malgraŭ malhelpoj, sen halto kaj staro  
al frata la celo ni iru obstine  
antaŭen, senfine.

## Novajetoj - Petites nouvelles

Ni bonvenigas s-inon **Yevgeniya (Ĵenja) Amis** en nian estraron (kie ŝi anstataŭas Martenon Benoit) kaj kiel redaktoron de *La Riverego* (en kiu ŝi anstataŭas Francis-kon Gauthier). Ukraindevena, Ĵenja akti-vis en la monda Esperanto-movado. In-teralie, ŝi ĉefredaktis la revuon *Kontakto*, eldonatan de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).



*Nous souhaitons la bienvenue à **Yevgeniya (Ĵenja) Amis** au sein de notre conseil d'administration (où elle remplace Martin Benoit) et au poste de rédactrice de La Riverego, où elle remplace Francis Gauthier. D'origine ukrainienne, madame Amis a été active dans mouvement espérantiste mondial ; elle a entre autres été rédactrice en chef du magazine Kontakto, publié par l'Organisation mondiale de la jeunesse espérantiste.*

Vi verŝajne eksciis pri la kreo de **Facebook**-paĝo por ESK. Nepre aliĝu kaj invitu viajn amikojn ! La ideon kaj realigon ni ŝuldas al Pierre Lavoie-Pouliot. Krom tio kaj krom sia laboro kiel kasisto, Pierre intencas ordigi kaj renovigi nian retejon. Bonan laboron !



*Vous avez sans doute pu remarquer que la SQE a dorénavant une page **Facebook**, une idée et une réalisation de Pierre Lavoie-Pouliot. Suivez-nous et invitez vos amis ! En plus de cela et de son travail de trésorier, Pierre a l'intention de s'atteler à un nettoyage de notre site web. Bon courage !*

Por plifaciligi tiun laboron, la estraro decidis ĉesigi la trilingvecon de nia retejo kaj **forigi la anglajn paĝojn**. Ili kreis al ni grandan laboron, kaj ni taksis ilin nenecesaj, konsidere la ekziston de informoj pri Esperanto en la retejoj de la Kanada Esperanto-Asocio kaj de Esperanto-USA.

*Pour faciliter ce travail, le C.A. a décidé de mettre fin au trilinguisme de notre site web. **Exit l'anglais.** Après tout, l'information sur l'espéranto est accessible sur les sites de l'Association canadienne d'espéranto et d'Espéranto-USA.*

La preparlaboroj por la **MEKARO 2011**, en **Kingston**, bone progresas. La horaro kaj aliaj informoj estos baldaŭ haveblaj. Kaj ni eĉ ekpensis pri la MEKARO de majo 2012, en Kebeko.



Kingstona Urbodomo  
(foto: <http://www.cityofkingston.ca>)

Verŝajne malsamos la etoso de la venonta Aŭtuna Rekontiĝo de Esperanto, **ARE**. Oni intencas ŝanĝi la programon : aldoni film-prezentojn, komunan boatadon kaj kantadon ĉirkaŭ fajro. Oni ankaŭ esploras pri nova loko, pli okcidente en la ŝtato Nov-Jorkio.

**Pli malproksime en la tempo** : nia prezidanto, Normando Fleury, kies domo ankaŭ gastigas la societon, t.e. paperojn kaj tre multajn librojn, emeritiĝos post kelkaj jaroj kaj intencas reiri, kun sia edzino Zdravka Metz, al sia naskiĝurbo Granby. Ili tamen ne kunportos la paperojn kaj librojn kun si, kaj ni sekve devos trovi novan gaston por ili.

*Le travail de préparation du **MEKARO de mai 2011**, à **Kingston**, progresse à grands pas. L'horaire et les autres informations devraient bientôt être disponibles. On commence d'ailleurs à penser au MEKARO de mai 2012, à Québec.*

*L'ambiance de l'Aŭtuna Rekontiĝo de Esperanto, **ARE**, sera sans doute différente dès l'automne prochain. On planifie la présentation de films, des promenades sur le lac, des chansons autour du feu. On pense même quitter Silver Bay pour un lieu plus à l'ouest dans l'État de New York.*

**À plus long terme** : notre président, Normand Fleury, qui héberge aussi notre siège social, c'est-à-dire tous nos papiers et aussi un impressionnant stock de livres, prendra sa retraite dans quelques années et retournera avec sa femme, Zdravka Metz, dans sa ville natale de Granby. Ils ne comptent pas emporter tous ces livres et documents avec eux. Nous devons leur trouver un nouveau refuge.



## Reformoj de la angla Silvano La Lacerto Auclair

*Dans le cadre de sa visite guidée des autres propositions de langue internationale, l'auteur nous présente notre pire ennemi, l'anglais, mais dans une version peut-être encore plus dangereuse.*

Nu, ekzistas pluraj provoj de artefarita internacia lingvo, ĉiuj malpli famaj ol Esperanto, sed la nuntempe ege pli ol Esperanto disvastigita interlingvo tutcerte estas la angla. Bonŝance por ni, tiu lingvo estas tamen malfacila; ĝia skribmaniero estas terure ĥaosa kaj malregula, eĉ por denaskaj anglalingvanoj. Pluraj observantoj rimarkis tiun problemon kaj proponis korektojn al ĝi, unuavice por helpi al la anglalingvanoj mem, sed ni povas demandi nin ĉu tiaj plibonigoj igus la anglan pli taŭga por ludi la rolon de internacia lingvo.

Estas du tipoj de proponoj. La unuaj uzas la Latinan alfabeton, ne ĉar ĝi estas pli taŭga, sed nur ĉar ĝi estas pli konata. Iuj proponoj simple iel solvas la ĉefajn problemojn de anglalingvanoj, ekzemple la silentajn vokalojn, kun rezulto laŭ mi tre simila al la lingvaĵo uzata en mesaĝetoj. Jen ekemplo: « *Wen readrs first se Cut Spelng, as in this sentnce, they ofn hesitate slytly, but then quikly becom acustmd to th shortnd words and soon find text in Cut Spelng as esy to read as Traditionl Orthografy, but it is th riter ho really apreciates th*

*advantajs of Cut Spelng, as many of th most trublsm uncertntis hav been elimnated.* »

Aliaj ĝisfunde pristudas la fonologion de la angla lingvo kaj proponas kiel eble plej fonetikan alfabeton. Kompreneble, la angla posedas tre multajn sonojn, interalie tre malsimplan vokalsistemon, kun mallongaj, longaj kaj diftongaj vokaloj, kaj cetere ĝia prononco varias laŭ la landoj. Sekve, oni povas trovi multajn sufiĉe malsamajn rezultojn al tia pristudo. Tiu ekzemplo, nomata SoundSpel, simple iel reguligas la skribon de la angla: « *It was on the ferst dae of the nue yeer the anounsment was maed, allmoest siemultaeniusly frum three obzervatorys, that the moeshun of the planet Neptune, the outermost of all planets that wheel about the Sun, had becum verry erratic. A retardaeshun in its velosity had bin suspected in Desember.* » Tiu alia, Basic Roman Spelling, estas pli fonetika kaj sekve aspektas malpli... angla: « *Uans apon a taym, da byutiful dootar av a greyt madzhishan uontid moor paarlz tu put amang haar trezharz. "Luk tru da sentar av da muun huen it iz bluu," sed haar royal*

*madar in ansar tu haar kueschan. " Yu mayt faynd yoor haarts dizayar. " Da fear prinses laaft, bikoz shi dautid diyz waardz. »*

Tiu alia, pli radikala, uzas supersignon por indiki la longajn diftongajn vokalojn de la mallongaj, dividas la kunmetitajn vortojn kaj krome indikas la akcenton per steleto. Ĝi estas nomata NuEnglish: «*In thu beg\*ining wuz thu Wurd, and thu Wurd wuz witt God, and thu Wurd wuz God. Thu sām wuz in thu beg\*ining witt God. Aul ttingz wur mād bī Him, and witt-out Him wuz not enē tting mād that wuz mād. In Him wuz līf, and thu līf wuz thu līt uv men. And thu līt shīnett in dorknus, and thu dorknus kompreh\*endud it not.*»

Fakte, la nurnura tia alfabeto, kiu spertis ioman sukceson, estas la *Initial Teaching Alphabet*, kiu uziĝis en 60-aj jaroj por instrui legadon kaj skribadon al infanoj, kiuj spertis problemojn en tiu kampo. Tiuj rapide povis skribi kaj legi en tiu regula skribmaniero, sed tio ne helpis ilin uzi la « normalan » anglan alfabeton. Ĉar tiu alfabeto uzas kunligitajn literojn por iuj sonoj de la angla, ne eblas al mi proponi al vi teksteton. Jen ligo:

<http://www.omniglot.com/writing/ita.htm>

## La Ŝava alfabeto

La alia tipo de propono uzas alian alfabeton. Tio

solvas la problemon de la malfacila kunrilato inter la vokaloj de la angla kaj la kvin aŭ ses vokal-literoj de la latina. La plej fama el tiuj proponoj estis kreita laŭ testamenta peto de la verkisto George Bernard Shaw (kaj tial nomiĝas *Shavian Alphabet*). Kuratoroj lanĉis konkurson laŭ la postuloj de s-ro Shaw, inter aliaj, neuzon de latinaj literoj, kaj la konkurson gajnis iu Ronald Kingsley Read (li poste kreis alian version de sia kreaĵo, nomatan *Quickscript*). Teatraĵo de Shaw estis eldonita en la du alfabetoj en 1962.

La rezulto estas laŭ mi tre bela (ĝi similas la birman alfabeton) kaj regula literaro. Oni povas tuj rekoni la vokalojn de la konsonantoj, kaj eĉ la longajn vokalojn de la mallongaj! Ekzistas kunligaĵoj por oftaj sonoj, kaj unuliteraj mallongigoj por oftaj vortoj *and, for, of, the* kaj *to*. Kaj en ĝi ne estas majuskloj! Jen la unua artikolo de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj en ĝi:

אנו מאשרים את כל האדם ליהנות מכל זכויות אדם. כל אדם נולד חופשי ושווה בדignity ובערכו. כל אדם חופשי ובערכו. כל אדם נולד חופשי ושווה בדignity ובערכו.

Kompreneble, tute ne eblas rekoni el tio, ke temas pri la angla lingvo!

Plu ekzistas eta movado por la Ŝava, kun retpaĝoj kaj eblo uzi la alfabeton per komputiloj. Unikodo rezervis kodojn por ĝi.



# Klingonlingva opero !

**Silvano Auclair**


Prezentiĝis en Hago dum kvar vesperoj opero en la klingona lingvo ! La premiero, okazinta la 10-an de septembro (post antaŭpremiero la antaŭan tagon), ludiĝis antaŭ plena 90-homa halo.

Ni memoru, ke la klingona lingvo estis elpensita de usona lingvisto Marc Okrand por uziĝi kiel lingvo de nehoma militema raso en la mondo de Star Trek.

La 90-minuta opero, nomata 'u', elparolata /ʔuʔ/ (ʔ = glota halto), rakontas bazan miton de la klingona kulturo, tiun de Kahless la Neforgesebla, fondinto de la klingona imperio. La verko estis poste prezentita en Germanio okaze de kunveno de klubo de fervoruloj pri Star Trek, kaj devus denove prezentiĝi en Nederlando en novembro...

*[Laŭ Vikipedioj franca kaj angla]*

Foto: Vikipedio






# L'espéranto est-il sexiste ?

Sylvain Auclair

Lors d'un cours d'espéranto, il y a de nombreuses années, alors que j'enseignais le préfixe *ge-* (qui caractérise une réunion d'êtres des deux sexes), l'une des étudiants s'exclama que l'espéranto avait enfin trouvé la solution au problème du sexisme des langues. Il est en effet beaucoup plus élégant d'utiliser ce préfixe que de farcir un texte de *e* mis entre parenthèses.

Pourquoi l'usage de ce préfixe est-il alors si restreint ? À part quelques mots, tels que *gefratoj* (frères et sœurs), on ne l'emploie pas de manière systématique. Une des réponses à cette question est qu'il ne peut s'employer, selon les règles, qu'au pluriel, laissant en suspend toute la question du genre « neutre » : un homme *ou* une femme.

En effet, si vous êtes souffrant et désirez rencontrer un médecin, dont le sexe vous indiffère, comment exprimer votre besoin en espéranto ? La plupart diraient qu'ils veulent voir un *kuraciston*. Mais alors, si un *kuracisto* peut être autant une femme qu'un homme, comment exiger un médecin masculin ?



Pour un médecin féminin, il suffit de dire *kuracistino*, avec le suffixe du féminin, et tout le monde comprend. Pour demander un homme, faudra-t-il dire *vira kuracisto* ?

La question a fait couler beaucoup d'encre. Selon certains, qui se basent sur des textes de Zamenhof, *kuracisto* ne pourrait se dire que d'un homme. Si le sexe de votre soignant vous indiffère, vous devriez donc demander à voir *kuraciston aŭ kuracistinon*. Comme vous commencez à vous en douter, on retombe sur le même problème qu'en français et les textes officiels devraient parler de *prezidant(in)o*, etc.

Tout ce problème vient évidemment du fait que l'espéranto a déjà plus de cent ans, et que le rôle des femmes dans la société a beaucoup changé depuis. On retrouve maintenant des femmes dans la plupart des professions, de telle sorte que la connaissance du sexe d'un(e) professionnel(le) a souvent peu d'importance. Mais, si le suffixe féminisant reste disponible, il n'existe pas de suffixe masculinisant...

## Quelques solutions

Les espérantistes étant des gens inventifs, chaque analyste y va de sa solution. On retrouve fréquemment le suffixe *ge-* au singulier, mais son usage n'est jamais systématique et les formes « masculines » et « neutres » se confondent souvent. Certains se sont élevés contre cet usage incorrect du préfixe *ge-* et ont proposé sans trop de succès le préfixe *go-*, qui signifierait de l'un ou de l'autre sexe.

D'autres prennent le chemin inverse et proposent un suffixe masculinisant. Le plus fréquemment rencontré est *-iĉ-* (d'après *-in-* et par homologie avec les suffixes diminutifs *-nj-* et *-ĉj-*). Les gens capricieux auraient donc le choix entre un *kuracistiĉo* et une *kuracistino*. On propose aussi l'emploi plus généralisé du préfixe masculinisant *vir-*, dont l'usage est actuellement restreint aux noms d'animaux.

Selon d'autres, le suffixe *-in-* devrait tout simplement tomber en désuétude, sauf dans certains mots, principalement du domaine des relations familiales. On aurait donc le choix entre un *vira kuracisto* et une *ina kuracisto*. Remarquons que les trois dernières propositions laissent au mot sans affixe ou sans adjectif une valeur neutre, alors que les précédentes, de manière moins symétrique, lui laissent une valeur masculine.

## Problèmes

Bien entendu, toutes ces solutions engendrent des problèmes. Le premier, c'est qu'ils amènent tous des changements au sens des mots et des suffixes, changements que certains considèrent *kontraŭfundamentaj*, ce qui suffit pour beaucoup à les discréditer d'emblée. De plus, on doit se rappeler qu'il existe plusieurs sortes de mots : certains, comme *viro* ou *taŭro*, incluent d'emblée le sexe dans leur signification. Dans le cas des termes concernant les relations familiales, il faudrait beaucoup d'imagination pour voir une mère autant qu'un père dans le mot *patro*. D'un autre côté, j'ai connu une femme outrée par le fait que le mot *patrino* dérive du mot *patro*. Pour des noms de métier, comme *kuracisto*, la valeur émotive est bien moindre et, d'ailleurs, on ne s'accorde pas toujours pour dire qu'un *kuracisto* est nécessairement un homme. Par ailleurs, la racine *vir-* signifiant à la base *homme adulte*, on pourrait refuser des mots comme *virknabo* ou *virĉevalo* (qui serait un centaure, peut-être ?), alors qu'un *virkuracisto* pourrait bien



Ĉu virĉevalo ?!

être un médecin spécialisé dans les maux n'affectant que les hommes...


## Et les pronoms ?

Le problème ne se rencontre pas que chez les noms. Les pronoms en souffrent également. Là-aussi, le pronom masculin *li* tend à représenter des êtres dont le sexe est inconnu, mais cela fait de chacun un homme par défaut. Dans une des *Lingvaj Respondoj*, Zamenhof semblait appuyer l'usage du pronom neutre *ĝi*, tout en remarquant le peu d'empressement qu'ont certains de « rabaisser » l'humain au rang de l'animal. Quoi qu'il en soit, on entend parfois *ĝi* dans ce sens, alors que d'autres s'en sortent par un emploi judicieux, mais parfois un peu compliqué, du pronom démonstratif *tiu* ou de *li aŭ ŝi*.

Bien sûr que l'on a, ici aussi, proposé de nouveaux mots. Les plus répandus des pronoms signifiant un homme ou une femme (ou un mâle ou une femelle) sont *ŝili*, *ŝli*, *gi*, *geli* et surtout *ri*. Prenant le problème par l'autre bout et reconnaissant l'usage de *li* pour désigner un humain d'un sexe indéterminé, on a aussi proposé le pronom *hi* quand il s'agit clairement d'un homme. Mentionnons ici qu'il existe des langues, comme le

hongrois, qui s'en tirent avec un seul pronom pour la troisième personne du singulier ; mais les Hongrois, pour dire *amie*, doivent utiliser un mot se traduisant par *ami-femme* — rien n'est parfait...

Au pluriel, le cas est plus simple, avec un seul pronom dont on s'accommode. Bien que certains, trouvant *ili* trop près de *li*, et pas toujours assez clair, utilisent parfois *iŝi* quand le groupe est composé exclusivement (ou principalement) de femmes. Ce qui introduit le problème là où il n'existait pas...



Là aussi, et de manière encore plus claire, on touche au *Fundamento de Esperanto*, qui présente la liste complète des pronoms personnels, et l'on s'expose donc à des accusations d'hérésie.

Comme on le voit, l'asymétrie entre les sexes est inscrite dans l'espéranto comme dans la plupart des langues naturelles. Les solutions nécessitant à peu près toutes de réécrire certains pans du *Fundamento*, elles sont difficilement recevables. On devra se contenter de rafistoler ici ou là.

[Ce texte est une version augmentée et mise à jour d'un ancien document d'information publié par la Société québécoise d'espéranto.]

## Mia plej ŝatata infan-libro *Jenja Amis*

La oktobra MEDO-kunveno estis mia unua Esperanto-renkontiĝo ekde nia translokiĝo al Montrealo, kaj ni estis tre impresitaj ne nur pri la kvanto da venintoj (12 homoj estas multe pli ol ni havis kutime en Atlanto!), sed ankaŭ pri tio, ke tri esperantistoj eĉ venis de aliaj urboj: Tririveroj kaj Kebeko!

Estis tre agrable revidi la konatojn, konatiĝi kun nekonatoj, babili pri infanlibroj, kun teo kaj kuketoj, kaj dividi la amon al niaj ŝatataj rakontoj.

Francisko Lorrain faris prezentaĵon pri la reel-dono de « La Eta Princo ». Fakte, li jam prezentis ĝin dum ARE 2010, sed Normando petis lin fari ĝin denove (« estas tiom da interesaj informoj, ke oni bezonas aŭskulti duan fojon! »). La prezentaĵo estis vere bela kaj interesa: temis pri la malfacilaĵoj de



la reviziado de la libro, pri la vivo (kaj la mistera morto) de la aŭtoro – la fama « Saint-Ex », kaj, kompreneble, la grandega laboro por reeldoni la libron (nur por doni la guston: 14 monatoj da laboro, pli ol 800 mesaĝoj, kvindeko da korespondintoj el pli ol dudek landoj!). Fakte, la libro estis reviziita tiom da fojoj kaj fare de tiom da homoj, ke Francisko kuraĝis anonci, ke ĝi havas eĉ ne unu tajperaron! Vi povas mem kontroli tion, kaj eĉ kun instigo:

por ĉiu trovita tajperaro li promesas doni dek dolarojn!

Kaj se vi ankoraŭ ne aĉetis vian propran ekzempleron de la libro, vi povas tion fari per la interre-

to: iru al la ESK-retpaĝo: <http://esperanto.qc.ca> – Donaci (Faire un don). La kosto estas 15 dolaroj plus la sendokostoj (10 \$ por Kanado).

# Kion ni faru ?

Suzanne Roy

Chers espérantistes et amis de l'espéranto, est-ce que vous vous interrogez sur votre contribution à ce merveilleux projet ? Est-ce que vous avez envie d'apporter votre petite pierre à ce grand édifice mais ne savez pas trop comment ? Moi aussi.

Quand j'ai contacté la Société québécoise d'espéranto (ESK), c'était d'abord pour offrir mon aide. Vous voyez le tableau : la nouvelle recrue enthousiaste qui arrive en disant : « Bon, qu'est-ce que je peux faire ? »... Mais ce n'est pas si simple.

La ESK ne demande rien à ses membres. Depuis des années, en fait, elle leur offre des services : soupers et soirées-conversation, fins de semaine touristiques, journal, librairie-bibliothèque. On a l'impression de profiter de plein de choses, pour une cotisation ridiculement basse. Je ne suis pas contre, bien sûr, mais, pour moi la question essentielle c'est : « Kion ni faru ? Qu'est-ce qu'on fait ? » Comment faire progresser l'espéranto au Québec ?

Je disais récemment à un jeune qui n'arrive pas à décider quelle voie prendre, quelle carrière choisir :

**J'invite chacun d'entre vous à réfléchir à ce qui pourrait être tenté dans votre milieu. La ESK est là pour vous soutenir dans vos projets.**

« Arrête de penser juste aux options, aux possibilités d'emploi, aux salaires. Prends ça par l'autre bout : pense en termes de projet de vie. De l'emploi, tu en trouveras toujours, mais qu'est-ce qui est vraiment important pour toi ? Qu'est-ce qui te semble valoir la peine de t'y consacrer ? Nourrir le monde ? Soigner le monde ? Éduquer le monde ? À partir de là, demande-toi de quelle manière toi, tu pourrais le mieux y contribuer, selon tes intérêts, tes talents, tes capacités. »

Essayons d'appliquer cette approche à « espérantiser le monde »... Pourquoi pas ? Alors, qu'est-ce que je peux

faire ? Qu'est-ce que TU peux faire ? Bien des choses ont déjà été accomplies, j'en suis consciente. Mais l'espéranto est encore inconnu de la grande majorité des Québécois. « Cent fois sur le métier remettez votre ouvrage », comme disait ma grand-mère. Il faut continuer, inventer de nouvelles manières... La nouvelle page Facebook de la ESK, belle innovation de Pierre, en est un exemple. À développer. À suivre.

J'invite chacun d'entre vous à réfléchir à ce qui pourrait être tenté dans votre milieu. La ESK est là pour vous soutenir dans vos projets. Avez-vous besoin d'un conférencier, d'un graphiste, d'un prof, de matériel en espéranto ou sur l'espéranto ? Venez aux prochaines rencontres à Montréal pour en discuter ! Ĝis !

## Rotarianoj en Montrealo

*Normand Fleury*

*En juin dernier, Rotary International tenait son congrès à Montréal. Quelques espérantophones étaient présents pour animer un kiosque sur l'espéranto.*

Junie, mi bude partoprenis la mondan kongreson de rotarianoj: interesa sperto, ĉar mi deĵoris kun gesinjoroj Grattapaglia el Brazilo. (Red.: Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia estas longtempaj volontuloj en la bieno-lernejo Bona Espero en Brazilo.)

Imagu kongreson kun dudek mil partoprenantoj, jes vere 20 000 personoj el la tuta mondo, sed ĉefe el Usono. Ili uzis la Centron Bell en Montrealo, ĉar la Kongresa Palaco estis tro malgranda por akcepti ilin ĉiujn samtempe. Do ni havis budon pri Esperanto dum kvar tagoj kaj disdonis centojn da informiloj en la angla, franca kaj hispana. Plurfoje mi estis interpretisto eĉ por aliaj budoj: de la angla al la hispana kaj inverse.

Laŭ la diro de s-ro Grattapaglia, rotarianoj estas tre similaj al esperantistoj: bonkoraj kaj helpemaj. La diferenco estas, ke esperantistoj estas malriĉaj kaj parolas Esperanton, dum rotarianoj estas riĉaj kaj parolas la anglan!



Interesa fakto estas, ke Rotaria amikaro de Esperantistoj (RADE) estas la plej malnova faka asocio de Rotary International. Ĉu rotarianoj interesiĝas pri Esperanto? Ne vere, kvankam ili alfrontas lingvajn problemojn kaj oficiale uzas dudekon da lingvoj (uzas en la senco « tradukas informilojn kaj broŝurojn en diversajn lingvojn », sed la kongreso uzas la anglan kiel laborlingvon... Ĉu iam la mondo komprenos, ke Esperanto povus multe helpi por proksimigo kaj komunikado inter la popoloj?..

# « Ankoraŭ estas utile havi organizaĵon, kie registaroj povu kunlabori »

*Bruce Arthur*

*Min interesis la du artikoloj pri la Unuiĝintaj Nacioj en la septembra numero de La Riverego kaj mi volas respondi per miaj ideoj pri ĉi tiu temo.*

Ĉu ni lernu pli pri la Unuiĝintaj Nacioj? Mi opinias, ke jes. Ĉu UN estas bona organizaĵo, kiun ni aprobu? Nu, estas malsimpla demando. Kio estas la Unuiĝintaj Nacioj? Fine de la Dua Mondmilito, la estroj de l' mondo volis preventi pliajn militojn. Ili decidis, ke la landaj registaroj devas konsenti nepre ne milit-ataki aŭ minaci ataki aliajn landojn. Se estas malakordoj inter la landoj, ties registaroj devas uzi nur pacajn metodojn por solvi ilin.

Landoj ankoraŭ rajtus uzi armeon por defendi sin, se alia lando atakus. Sed, tiukaze, oni petu helpon de ceteraj landoj. La registaroj de ĉiuj landoj devas helpi la atakatan landon kaj malhelpi la atakanton. Ili devas nepre fari tion; tiel ĉiu registaro scius, ke iu ajn atako kontraŭ alia lando malsukcesus. Registaroj sentus sin sekuraj, kaj tiel ili ne bezonus grandajn armeojn.

La registaroj, kiuj fondis la Unuiĝintajn Naciojn diris, ke ili apogas ĉi tiujn principojn. Kaj la registaroj de aliaj landoj, kiuj aliĝis al UN pli poste, same promesis agi laŭ tiuj principoj.

Por kunordigi la sistemon, membroj de la Unuiĝintaj Nacioj elektas plurajn registarojn el inter si al la Konsilio de Sekureco (kiu havas ankaŭ kvin konstantajn membrojn). Se estas raporto, ke iu registaro atakas aŭ minacas ataki alian, tiu Konsilio decidus, ĉu estas vera atako aŭ minaco, kaj kiel pritrakti ĝin. Ĉiuj membroj de UN devas obei la decidojn de la Konsilio de Sekureco; ili promesas tion fari, kiam ili aliĝas al la organizaĵo.

Nu, post la fondiĝo de UN, ja ankoraŭ estis militoj. Kial? Ĉu la principoj malpravas? Ĉu la Unuiĝintaj Nacioj, kiel organizaĵo, malpravas? Mi opinias, ke ne. Mi opinias, ke la principoj estas bonaj. Efektive, mi pensas, ke neniuj aliaj principoj povus preventi militojn inter la registaroj. Mi pensas, ke la problemo estas, ke registaroj ne agas laŭ la principoj — eĉ la registaroj de la demokratiaj landoj ofte ne agas laŭ ili. Kial? Kiam mi estis juna, mi supozis, ke preskaŭ ĉiuj kanadanoj apogas la UN-principojn. Sed antaŭ pluraj jaroj la kanada mararmeo atakis hispanan ŝipon en la neŭtrala oceano (tio estas, ekster kanadaj akvoj).

Tio estis milita ago, kiu kontraŭis la principojn de UN. Mi ŝokiĝis. Sed preskaŭ ĉiuj kanadanoj festis. Tio ŝokis min eĉ pli. Kelkajn jarojn poste, Kanado helpis ataki Serbion, kvankam la Konsilio de Sekureco ne apogis tion — sed tre multaj kanadanoj apogis tiun agon. Kaj kiam Usono atakis Irakon sen la apogo de la Konsilio de Sekureco, multaj kanadanoj ankaŭ apogis tion. La ĉefministro Jean Chrétien, post longa nedecidemo, finfine decidis ne apogi la atakon. Sed Stephen Harper, la opoziciestro, apogis la atakon, kaj la kanadanoj sekve elektis lin ĉefministro. Jean Chrétien ekŝiĝis, kaj lia partio elektis novan estron, Michael Ignatieff, kiu ankaŭ apogis la atakon kontraŭ Irako.

Mi esperas, ke se kanadanoj scius pli pri la principoj de UN, ili apogus ilin.

La Unuiĝintaj Nacioj ankaŭ havas duan celon. La UN-fondintoj deziris, ke la registaroj povu kunlabori pli bone por solvi diversajn ekonomiajn kaj sociajn problemojn. Ili povas kunlabori en UN mem kaj en la diversaj parencaj organizaĵoj. Ekzemple, por la Monda



UN-membroŝtatoj (Wikipedia)

Organizaĵo pri Sano ili kunlaboras por trakti gripojn kaj aliajn malsanojn, kaj estas centoj da aliaj ekzemploj de tia kunlaboro. Ĝi estas libervola: landoj restas sendependaj, kaj ili kunlaboras, nur se ili volas.

Mi pensas, ke la kunlaboro kaj informinterŝanĝo inter la registaroj estas ĝenerale bonaj. Ĉu ĉiam? Ne. Sendi delegitojn al multekostaj kunvenoj ne nepre estas la plej bona metodo elspezi monon. Sed iu ajn lando rajtas decidi, ĉu partopreni kunvenojn aŭ ne.

Iuj plendas, ke UN estas organizaĵo de registaroj. Ĉu ne estus pli bone havi organizaĵon de homoj? Jes, estas bone havi organizaĵon de homoj, kaj tiaj organizaĵoj ekzistas. Ekzemple, ili povas antaŭenigi ideojn (kiel Esperanton), kiujn registaroj (ankoraŭ) ne apogas. UN ne apogas tiajn ideojn — sed estas bone, ke ĝi faras nun tion, kion deziras ĝiaj membroj. Ankoraŭ estas utile havi organizaĵon, kie registaroj povu kunlabori. Kaj preventi militojn inter registaroj certe estas dezirinda celo.



## La ricinsemoj Francisko Lorrain

*Jen vera historio, rakontita de konato mia,  
forpasinta antaŭ pluraj jaroj.*

Dum la Dua Mondmilito, du francaj kaptitoj laboris en farmbieno en Germanujo. Oni sendis ilin tien, ĉar la viroj de la bona familio soldatis ie en la milito. La du francoj estis tie dum la tago, sed vespere reiris al la koncentrejo por dormi. Unu estis urbano, la alia kamparano. Por la unua, tiu laboro estis nekutima, kaj li grumblis pri ĉio. La dua kontentis pro la, por li, tute kutimaj, eĉ interesaj taskoj — kaj ĝuis la bonan, simplan, sed sanan manĝaĵon. Ĉu li ne ankaŭ sekrete amikiĝis kun la bienestrino? Tion almenaŭ li ne rakontis al sia familio, kiam li revenis hejmen post sia liberiĝo!

La urbano malestimetis sian kunulon kiel tro facilan viron. Iun tagon la bienestrino petis la urbanon semi en iu loko sakon da ricinsemoj. Li komencis fari tion, sed baldaŭ kalkulis tiun laboron tro laciga. Li do prenis la reston de la semoj kaj enterigis ĝin en la sterkamason malantaŭ la stalo. Poste li fiere rakontis tion al sia kunulo. Tiu ĉi tuj konsterniĝis kaj urĝe flustris al li: « Stultulo! Fuŝulo! Kion vi faris? En la sterko la semoj rapidege kreskos. Ricino povas fariĝi grandega planto, du, tri metrojn alta: la estrino tuj komprenos, kien vi metis la semojn! » Ili tuj elfosis la ricinsemojn el la sterkamaso kaj zorgo replantis ilin en la bona loko.

Ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo!

**Avo Frosto pretas respondi leterojn  
en Esperanto! Sendu manskribitan  
leteron al:**



## ĈU ANKAŬ VI VOLAS IĜI DELEGITO DE UEA?

**Se vi jam estas membro de UEA dum unu jaro  
kaj plenumas la ceterajn devojn, vi povas iĝi  
Delegito, Vicdelegito, Junulara Delegito aŭ  
Faka Delegito de ĝia Delegita Reto.**

Plenigu la respondilon en la Reto Jarlibro aŭ elŝutu tiun ĉe  
[www.uea.org/asisto.html](http://www.uea.org/asisto.html), plenigu ĝin kaj sendu al  
Olga Du Temple, 765 Braemar Avenue,  
V8L 5G5 North Saanich BC.

**ALIĜU AL NIA RETO!**

## Rete

### Un document très important enfin consultable

*Il est enfin possible de lire le fameux rapport publié en 1922 par la Société des Nations sur l'espéranto dans les deux langues de cette organisation internationale :*

#### **L'espéranto comme langue auxiliaire internationale**

[http://vortareto.free.fr/argumentaire/sdn/sdn\\_index.htm](http://vortareto.free.fr/argumentaire/sdn/sdn_index.htm)

#### **Esperanto as an international auxiliary language**

<http://www.archive.org/details/esperantoasinter00leagrigh>

*Enfin accessible au public, ce document de 44 pages sera utile pour faire comprendre aux autorités de l'éducation et au public pourquoi l'espéranto n'est pas enseigné aujourd'hui dans toutes les écoles du monde, et comment, à cause d'un gouvernement français, la place a ainsi été laissée libre pour l'anglais.*

[fonto : [soc.culture.esperanto](http://soc.culture.esperanto)]

### Planlingvo : la filmo

Antaŭ kelkaj monatoj Verda Filmejo informis, ke grupo de studentoj de universitato *Columbia* kreis 15-minutan ludfilmon pri planlingvoj « Conlang : the movie ». Temas fakte pri lingvokonstruistoj kaj amo. Esperanto rolas tie ne la lastan rolon (*Red. : fakte, en tiu ĉi filmeto la esperantisto estas « malheroo »; vidu intervjuon kun la*

*reĝisoro en Libera Folio : <http://www.liberafolio.org/2010/la-malheroo-estas-esperantisto>.) La filmo jam furoris en kelkaj filmaj festivaloj kaj ricevis premion. Konata esperantisto, fondinto de Esperanto-vikipedio kaj aktivisto Chuck Smith, aktive kunlaboris kun la kreantoj. Kiel rezulto, en la oficiala eldono de DVD-disko kun la filmo aperos subtekstoj en Esperanto. Vidu ĉi tiun filmeton kun subtekstoj en Esperanto : <http://www.kickstarter.com/projects/462792628/conlang-special-limited-edition-dvd/posts/38208>*

[Laŭ Ret-Info - <http://www.eventoj.hu>]

### Artikoloj kun pozitiva mencio pri Esperanto

#### **Le Devoir (22-a de novembro 2010)**

<http://www.ledevoir.com/societe/actualites-en-societe/311483/l-entrevue-le-philosophe-de-toutes-les-certitudes> (nur abonantoj povas vidi la plenan version)

#### **Mediapart (23-a de septembro 2010)**

<http://www.mediapart.fr/club/edition/rencontres-avec-l-esperanto/article/230910/dit-lassemblee-nationale-porteuse-dun-bel-id>

#### **Zamenhof-simpozio (Novjorko, 15-an de decembro 2010)**

<http://sites.google.com/site/zamenhofsymposium2010>

#### **Pri la 17-a ARE (2010)**

<http://www.esperanto-usa.org/en/content/17a-are>

## Montrealaj Esperanto-Kunvenoj (MEK)

<i>Tago</i>	<i>Dato</i>	<i>Horo</i>	<i>Loko</i>	<i>Temo</i>
<b>Sabato</b>	<b>11-a de decembro 2010</b>	<b>19 h 30</b>	<b>Commensal*</b>	<b>151-a datreveno de L.L. Zamenhof</b>
<b>Vendredo</b>	<b>28-a de januaro 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>MEDO</b>	
<b>Vendredo</b>	<b>25-a de februaro 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>Commensal St-Denis*</b>	
<b>Vendredo</b>	<b>25-a de marto 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>MEDO</b>	
<b>Vendredo</b>	<b>29-a de aprilo 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>MEDO</b>	
<b>Vendredo</b>	<b>27-a majo 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>MEDO</b>	
<b>Vendredo</b>	<b>17-a de junio 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>Commensal St-Denis*</b>	
<b>Vendredo</b>	<b>30-a de septembro 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>Commensal St-Denis*</b>	<b>Jarkunsido de ESK</b>
<b>Vendredo</b>	<b>28-a de oktobro 2011</b>	<b>19 h 30</b>		
<b>Vendredo</b>	<b>25-a de novembro 2011</b>	<b>19 h 30</b>		
<b>Sabato</b>	<b>17-a de decembro 2011</b>	<b>19 h 30</b>	<b>Commensal*</b>	<b>152-a datreveno de L.L. Zamenhof</b>

\* Manĝo : 18 h; babilado : 19 h 30

**Commensal St-Denis (Restaurant végétarien Montréal – rue Saint-Denis) : 1720, rue St-Denis (entre Maisonneuve et Ontario, métro “Berri-UQAM”), Montréal.**

[http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint\\_denis](http://www.commensal.com/fr/ou/restaurants/saint_denis)

## Pliaj Esperanto-renkontiĝoj

21-23-a de majo 2011	8-a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kingston, Ontario
3-6-a de junio 2011	Kongreso de Esperanto-USA	Emeryville, Kalifornio
8-10-a de oktobro 2011	ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto)	Silver Bay, Nov-Jorkio
19-21-a de majo 2012	9-a MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)	Kebeko, Kebekio



**Esperanto-Societo Kebekia**  
**Société québécoise d'espéranto**

**La Riverego** estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Redaktado kaj grafikoj : Yevgeniya Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Suzanne Roy (vicprezidanto), Sylvain Auclair (sekretario), Pierre Pouliot-Lavoie (kasisto), Yevgeniya Amis (konsilanto).

**Limdato por la venonta eldono /**

**Échéance pour le prochain numéro : 2011.2.20**

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à **riverego(à)esperanto.qc.ca**

**Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**  
**6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, H2G 2R8**

(Vidu retejon por vidi kiel atingi)  
(Voir site web pour un plan d'accès)

*Libroservo, biblioteko nepre kun antaŭa rendevuo*  
*Librairie, bibliothèque sur rendez-vous seulement*

**La Riverego** (*Le Fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

Rédaction et graphisme: Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire), Pierre Pouliot-Lavoie (trésorier), Yevgeniya Amis (conseillère).

**6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8**  
**info@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca**

**Service de librairie postale à Montréal**

**La libroservo de KEA en Montrealo akceptas mendojn rete kaj letere. Konsultu la retejon por pliaj informoj.**

**Service de librairie postale à Montréal**

Le service de librairie de KEA accepte les commandes par courriel et courrier. Consultez le catalogue en ligne.

[www.esperanto.qc.ca/katalogo](http://www.esperanto.qc.ca/katalogo)

**Pasporta Servo 2011 !**

**Aliĝu tuj se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :**

**[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org).**

**Vi povas ankaŭ kontakti Normandon (normandlfleury(ĉe)esperanto.qc.ca), kiu estas la peranto por Kanado.**